


LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
(N.H.) NEDERLANDO
ĜIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
14 FR.FR.; 0,70DOL.; 2,15V.FR.

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

PASTISTO DE PORKOJ.

(teatraĵo en kvin aktoj).

Personoj:	{	Imperiestro
		Reĝidino
		Korteganinoj (tri aŭ pli)
		Reĝido
		Servisto

*(La fabelo de Andersen, laŭ kiu la teatraĵo estas farita, pri-
skribas, ke alta deveno tamen ne signifas civilizecon kaj deli-
katajn sentojn. El la prezentado tio klare montriĝu. La scenejo
ne ŝanĝiĝas. Ĝi prezentas la placon antaŭ la kastelo. En la
fono staras la palaco de la imperiestro. La muzikon de la tintila
poto kaj de la knarilo oni faru malantaŭ la kulisoj per iu muzik-
ilo, ekz. violono aŭ gitaro. Kiel dancon por la korteganinoj oni
studu iun malnovan, belan popoldancon. La korteganinoj dan-
cas, la reĝidino venas, la korteganinoj disiras kaj riverencas).*

Korteganinoj: Bonan tagon, reĝidino.

Reĝidino: Kion vi faris tie?

Korteganinoj: Ni dancis, reĝidino.

Reĝidino: Ho, anstataŭ okupi vin pri mi! Terure mi enuas.

Korteganino: Jes, reĝidino. (riverencas).

Reĝidino: Fermu la buŝon!

Korteganino: (manon antaŭ la buŝo) Jes, reĝidino.

Reĝidino: Ankaŭ vi tedas min (la korteganinoj riverencas). Post tri jaroj
mia patro volas forlasi la reĝecon; tiam post li mi sekvos. Mia patro
deziras, ke antaŭ tiu tempo mi edziniĝu. Nun ni vidu, ĉu mi bone
figuros sur la trono.

Korteganinoj: Jes, jes, reĝidino, ni helpos en la provado. (La korteganinoj
forkuras kaj alportas apogseĝon kaj ordinarajn seĝojn, kiujn ili aran-
ĝas, dum la reĝidino ĉion kritike observas kaj ekzercas majestan
iradon).

Korteganinoj: Jen, ĉi tiun ni metu tien. Prenu ĝin. Atentu, metu ĝin firme
sur la teron, alie ŝia moŝto povus defali. Imagu!

Reĝidino: (ordigas siajn vestojn kaj paŝadas turniĝante): Ĉu mi tiel iras kiel imperiestrino?

Korteganinoj: Ho jes, vera imperiestrino!

Ĝuste kiel imperiestrino!

Kia brila imperiestrino!

Tia belega imperiestrino ĝuste decas sur la trono!

Ĉu la irtapiŝo jam estas sternita?

(La reĝidino paŝas al la trono, timeme eksidas, dum la korteganinoj ŝin helpas).

Korteganinoj: Estu singarda, via imperiestrina moŝto.

Reĝidino (sidas sur la apogseĝo kaj fikse rigardas antaŭ si): Nu, vi nun dancu kiel ĵus. *(La kort. ekdancas. La imperiestro aperas en la kastelpordo, proksimiĝas kaj subite li staras inter la sinjorinoj)* .

Korteganinoj (diskuras, subridante): La imperiestro, la imperiestro!

Reĝidino (ruliĝas pro eklimo de sia trono): Hoooo!!

Imperiestro: Kion vi ĉiuj faras?

Reĝidino: Ni ludas, ho reĝa patro!

Korteganino: Kun via permeso, ni ludas, via imperiestra moŝto.

Imperiestro: Ha tiel, vi ludas? Kiajn kapricojn vi ĉiam havas! Por tio vi estas jam tro aĝa, reĝidino. Kion opinias la najbaroj! Elektu edzon por vi; jen, ĝuste iu venas. *(servisto venas de maldekstre, li riverencas kaj diras).*

Servisto: Bonan tagon, via moŝto!

Imperiestro: Kion vi deziras?

Servisto: La reĝido de Rozokastelo kaj Najtingalujo sekvas min senpere. Li deziras edziĝi al la reĝidino.

Reĝido (alvenas): Bonan tagon al via moŝto! Mi serĉas edzinon kaj nun mi venas al vi peti vian filinon kiel edzinon.

Imperiestro: Hm, hm!

Reĝidino: Ĉu vi estas tre riĉa?

Reĝido: Ne, sed mi havas malgrandan, sed tre, tre belan regnon! Kaj tamen sufiĉe granda por edziĝi en ĝi. Mi povas doni al vi florojn ruĝajn, blankajn, bluajn kaj flavajn, ĉiujn el mia regno.

Servisto: Kaj la plej belaj similas arĝenton.

Reĝido: Kaj en mia regno estas multaj birdoj, kiuj kantas kaj fajfas la tutan tagon.

Servisto: Kaj iliaj flugiloj brilas kiel oro.

Reĝidino: Tamen mi ne kredas, ke vi estas tre aristokrata.

Korteganinoj: Ne, vi ne estas sufiĉe aristokrata.

Reĝido: Sed, kara reĝidino. Provu tamen kun mi. Mi donacos al vi ion tre belan!

Imperiestro: Bone, estu tiel! Sendu la donacojn. Se ili plaĉos al mi kaj al la reĝidino, ŝi devos fariĝi via edzino.

Reĝido: Ĝis revido, via imperiestra moŝto! Baldaŭ vi sciiĝos pri mi!

Servisto: Kaj tiam la reĝidino apartenos al ni! *(ambaŭ foriras, multe riverencante. La imperiestro svingas la naztukon salute al ili).*

Imperiestro: Ĝis revido! Nu, mi scivolos, kion ili sendos!

Reĝidino: Ho, certe ne estos multe, li estas ja tro malriĉa!

Korteganinoj: Jes, tro malriĉa!

Reĝidino: Kaj mi ne volas havi tian malriĉan edzon.

Imperiestro: Silentu! Ni atendos. Kaj promeso postulas plenumon. (*al korteganino*): Vi nun iru senpolvigi mian tronon. (*al la reĝidino*):

Kaj vi poluru mian kronon spegulblanka! Ĉu vi aŭdas? Spegulblanka!

Reĝidino (murmure): Jeees!

(*La imperiestro reiras en la kastelon. Apenaŭ li estas for, kiam la reĝidino piedbatas la teron, kaj diras*): Sed al tiu reĝido mi tamen ne edziniĝos. Neniam! Li estas tute ne aristokrata, kaj la kronon mi ne poluras!

Korteganinoj: Ne, tute ne aristokrata!

Reĝidino: Iru, vi devas senpolvigi la tronon, kaj mi observos, ĉu vi bone laboras. (*ĉiuj foriras*).

DUA AKTO.

(*La imperiestro paŝas tien kaj reen, profunde en pensoj. De temp' al tempo li haltas, metas fingron sur la frunton, skuas la kapon, deprenas sian kronon, kaj viŝas la ŝviton de sia frunto*).

Imperiestro: Ho, kiom malfacila estas la regado. Kaj plej malfacile regebla estas mia filino.

Servisto (venas): Saluton al vi, via moŝto. Jen mi revenis.

Imperiestro: Bonan tagon, servisto. Kian grandan pakaĵon vi alportas?

Servisto: Pst! Jen la donacoj, kiujn mi kaj la reĝido elektis por nia estonta edzino.

Imperiestro: Ĉu estonta edzino?

Servisto: Ho, vi ja scias! La reĝidino! Se ni plaĉas al ŝi, vi devos doni ŝin al ni kiel edzinon. Tion vi ja promesis.

Imperiestro: Jes, jes! Promeso devigas al plenumo. Montru nun la donacojn; (*sammomente venas de dekstre la reĝidino kaj la korteganinoj*).

Imperiestro (al la servisto): Jen ili jam venas; rapide donu al mi la pakaĵon. (*li prenas la pakaĵon kaj tenas ĝin malantaŭ si; al la korteganinoj li diras*):

Venu ĉi tien kaj salutu min!

Korteganinoj: Saluton al vi, imperiestra moŝto!

Reĝidino: Saluton, reĝa patro! (*kisas lin sur la vangoj*).

Imperiestro: Aŭskultu, mi havas ion por vi.

Reĝidino: Ho, kara paĉjo imperiestra, montru ĝin.

Korteganinoj: Ho, montru ĝin, ni petas.

Imperiestro: Bone, sed antaŭe donu kison al mi.

Reĝidino: Paĉjo, kara reĝa paĉjo! (*kisas lin*).

Imperiestro: Nu, atentu! Ni komencos elpaki. (*Li redonas la pakaĵon al la servisto, kiu elpakas ĝin per tro multe da movoj*).

Reĝidino: Ho, se tio estus kateto!

Korteganinoj: Ho jes, kateto kun blanka, mola hararo!

Servisto: Jen la unua donaco! Ĉi tiu rozo estas unika. Aŭskultu! Sur la tombo de la patro de la reĝido kreskas rozarbeto! Nur unu fojon en kvin jaroj ĝi floras, kaj eĉ tiam ĝi donas nur unu solan rozon. Sed la rozo havas tian belegan bonodoron, ke ĉe ĝia odorado oni forgesas ĉiujn siajn zorgojn kaj afliktojn.

Reĝidino (palpante la rozon): Fi, paĉjo! Mi tute ne ŝatas naturajn rozojn. Ĝi devas esti arta!

Korteganinoj: Fi, ĝi estas nur natura!

Imperiestro: Antaŭ ol koleri ni rigardu, kio troviĝas en la dua skatolo (*la servisto elpakas najtingalon, kiu tuj ekkantas*).

Servisto: Tiu ĉi najtingalo povoscias kanti tiel, kvazaŭ ĉiuj ĉarmaj melodioj loĝus en ĝia malgranda gorgo.

Korteganinoj: „Superbe!” „Ĉarmant!”

Plej maljuna korteganino: Kiel ĉi tiu birdo rememorigas al mi la muzikan kesteton de la alte mortinta imperiestrino! Ho jes, tio estas ĝuste la sama tono, la sama plenumado.

Imperiestro (ekploras): Jeees.....

Reĝidino (krias): Tio ja espereble ne estas natura.

Servisto: Jes, tio estas natura birdo. La plej bela birdo, kiu loĝas en la plej bela arbo de la reĝa arbaro.

Reĝidino (kolere): Nu, en tia okazo lasu la birdon flugi.

Korteganinoj: Fi, lasu ĝin flugi! (*Ĉiuj krias*): La najtingalo devas for!

Imperiestro: Ĉu ankoraŭ ion vi havas?

Servisto: Ne, via moŝto. Nur la malplenan skatolon.

Reĝidino: Mi neniel volas permesi, ke la reĝido venu!

Imperiestro: La reĝidino estas ofendita.

Korteganinoj: Jes, tre ofendita. (*la reĝidino kaj la kort. foriras kun fiere levita kapo*).

Imperiestro: Do, vi povas foriri! (*la imperiestro foriras*).

Servisto: Jen mi nun staras!

TRIA AKTO.

(*La servisto staras sur la podio. La reĝido venas de maldekstre*)

Reĝido: Kiam mi rajtos veni? Rapide purigu mian dimanĉan jakon kaj alportu ĝin Sed kio estas al vi?

Servisto: Ĉio estas for, via moŝto, ĉio for! La reĝidino ne akceptas vin. Neniel.

Reĝido (malĝoje): Ĉu mia rozo ne odoris al ŝi en la koron? Ĉu la najtingalo ne kantis al ŝi por mi?

Servisto: Ĝuste pro tio! La rozo odoris plej dolĉe, la najtingalo kantis plej bele, kaj mi parolis ankoraŭ pli bele! Sed pli bone vi sendu al ŝi grandan botelon da parfumo kaj kelkajn kunkudritajn ĉifonojn kun surskribo: „rozo”. Tiam vi gajnos la koron de la reĝidino. Sed per io natura! „Fi” diris ĉiuj. Mi jam diris al vi!!

Reĝido: Ĉu tiel statas la afero! Sed mi ne lasas timigi min. Rapide alportu viajn plej malnovajn vestojn.

Servisto: Kio nun? Kial? Kial? Kio okazos?

Reĝido: Kial vi hezitas? Rapidu!

Servisto: Mi jam iras! (*for*).

Reĝido: Tamen mi akiros la reĝidinin! Se mi ne rajtas kiel reĝido eniri ŝian korton, mi venos en alia formo.

Servisto (alportas la vestojn): Jen mia eluzita, malpura jako.

Reĝido (vestas sin, ŝmiras al si la vizaĝon per nigra kaj bruna farbo): Nu, kiel ili konvenas al mi?

Servisto: Bonege, kvazaŭ por vi faritaj!

Reĝido: Ne babilu! Donu vian ĉapelon!

Servisto: Jen ĝi!

Reĝido (ŝovas la ĉapelon forte malsupren): Do, mi estas preta. Kaj vi bone gardu nian domon!

Servisto: Ĝis revido! Kiom longe vi intencas forresti?

Reĝido: Tre baldaŭ mi ne revenos. (*foriras*).

Servisto: Sekve mi povos sidi dume sur la trono; fakte mi bone povus esti princo! (*digne forpaŝas*).

KVARA AKTO.

(*La alivestita reĝido frapas sur la pordon de la kastelo; la imperiestro rigardas eksteren*).

Reĝido: Bonan tagon, imperiestro. Ĉu mi ne povus ĉi tie en la palaco ricevia oficon?

Imperiestro: Ha, tiom multe da personoj serĉas ĉi tie oficon! Tamen atendu! Mi nun efektive bezonas iun, kiu povus gardi porkojn, ĉar mi havas grandan nombron da ili. Ĉu vi opinias, ke vi kapablas okupi ĉi tiun postenon?

Reĝido: Sed kompreneble, imperiestro.

Imperiestro: Bone, de nun vi do estos imperiestra porkopaŝtisto. Post la tria servo-jaro vi ricevos oficialan enoficigon kaj rajton je pensio.

Reĝido: Mi dankas vin, ho moŝto.

Imperiestro: Jen via loĝejo. Bone kondu! Ĉiuvespere mi venos kontroli, ĉu miaj porkoj estas viglaj kaj sanaj. (*foriras*).

Reĝido: Do, mi nun estas porkogardisto. Rapide mi pretigos la porkontraĵon kaj tiam mi eklaboros! (*Li foriras, sed tuj revenas kun poteto kaj rubando kun tintiloj. Li intencas fari el tio ludilon, eksidas en la dekstra angulo kaj komencas labori*).

Reĝido: Ankoraŭ ĉi tiun bluan rubandon kun la tintiloj ĉirkaŭ la poteton, kaj jen la ilo estas preta. Nu, ludu poteto! (*Li kirlas en la poteto kaj ĝi ludas: Ho, vi kara Aŭgusteno! Post tio li metas fingron en la poteton kaj flaras*).

Reĝido: Ho, kiom bonodoras! Mi flaras rostaĵon, fiŝaĵon! Tio troviĝas sur la reĝa tablo! Kaj ĉokoladon, kukon, mi flaras! Tio estas sur la reĝidina tablo! Sed jen, ŝi mem ĝuste venas! (*Rapide li sidiĝas en angulo kaj ludigas la poteton. Venas la reĝidino kaj la korteganino. Ili aŭdas la muzikon kaj tuj ekdancas*).

Reĝidino: Tion mi ankaŭ scipovas (*movas laŭ la takto de l'muziko unu fingron, kvazaŭ per ĝi pianludante*). Tio certe estas tre klera porkpaŝtisto. Aŭskultu, iru tien kaj demandu lin, kiom kostas la instrumento.

Korteganino: Ho fi, al la porkpaŝtisto, sed estas tie tre malpure!

Reĝidino: Vi devas iri. Se ne, mi rakontos tion al mia patro, la imperiestro. Vi povas surmeti lignoŝuojn.

Korteganino (*alportas lignoŝuojn, surmetas ilin kaj singarde paŝas al la porkogardisto*): Kion vi postulas pro la poto?

Reĝido: Mi postulas dek kisojn de la reĝidino.

Korteganino: Dio nin gardu.

Reĝido: Jes, malpli mi ne povas preni. (*La korteganino reiras al la reĝidino kaj formetas la lingnoŝuojn*).

Reĝidino: Nu, kion li diris?

Korteganino: Tion mi efektive ne povas eldiri. Ĝi estas terura.

Reĝidino: En tiu okazo vi povas flustri tion al mi en la orelon. (la kort. flustras al ŝi en la orelon): Li estas malbonkondata! (*Ili rapide volas foriri. Tiam ree li ekludas, kaj ili denove rigardas kaj ekdancas*).

Reĝidino: Aŭskultu! Demandu lin, ĉu li volas preni dek kisojn de miaj korteganinoj.

Korteganino (*kolere*): Fi, kisi tiun aĉan porkogardiston. Ne, tion mi rifuzas.

Reĝidino: Rapide demandu lin, alie vi ne povos resti ĉe mi.

Korteganino: Mi jam iras (*surmetas la lignoŝuojn, iras al la gardisto*). Aŭdu, porkogardisto, la reĝidino demandas, ĉu mi povas doni la dek kisojn.

Reĝido: Ho ne, dek kisojn de la reĝidino, alie mi ne donos la poton. (la korteganino reiras).

Reĝidino: Nu?

Korteganino: Vi devas lin kisi, se ne, li tenos la tintilopoton.

Reĝidino: Kia ĉagrena afero. Sed en tia okazo vi devas almenaŭ stariĝi antaŭe, ke neniu povu tion vidi!

(*La korteganinoj stariĝas antaŭ si, dislarĝigas siajn vestojn; la reĝidino donas la kisojn, la korteganinoj nombras*);

Korteganinoj: Unu, du tri, ktp. Ho, jen estas la deka.

Reĝido: Ha, kia feliĉo tio estis! Multan dankon, reĝidino. Jen la poto. (Ili rigardas la poton. La reĝidino kirlas en ĝi kaj tuj ĝi ekludas. La korteganinoj dancas. Post tio ili enmetas fingron kaj flaras).

Reĝidino: Ha, tio estas rava! Mi flaras supon kaj patkukon. Tion oni pretigas por la ĉambelano, tiu kun la longa nazo.

Korteganino: Kaj mi flaras griaĵon kaj karbonadon!

Reĝidino: Tion oni pretigas por la predikanto, tiu kun la grandaj okulvitroj. Kiel belege! Kiel ravante!

Korteganinoj: Efektive ravante! Delikate!

Reĝidino: Sed bone silentu! Ĉar mi estas ja filino de la imperiestro!

Ĉiuj korteganinoj: Eĉ unu vorteto ne trapasos niajn lipojn! (*la poto ludas kaj la inoj dancas for*).

KVINA AKTO.

- Reĝido*: Nun denove mi eklaboros kaj pretigos ion multe pli belan. (*li sidiĝas en angulo kaj laboras pri knarilo*).
- Jen, ankaŭ ĝi estas preta. Komencu ludi. (*Li turnas la knarilon, ĝi aŭdigas gajan dancon. La korteganinoj venas kaj aŭdas la gajan muzikon. Rapide ili venigas la reĝidinojn*).
- Reĝidino*: Sed tio estas „superbe“! Neniam mi aŭdis ludadon de pli bela artaĵo. Iru al li kaj demandu lin, kiom la instrumento kostas. Sed kisojn mi ne donos!
- Korteganino*: Mi diros al li. Sed kie troviĝas miaj lignoŝuoj? (*surmetas ilin kaj iras al la paŝtisto*). Aŭskultu, paŝtisto, la reĝidino deziras ekhavi vian instrumenton. Diru, kiom ĝi kostas.
- Reĝido*: Nur cent kisojn de la reĝidino.
- Korteganino*: Kiom?
- Reĝido*: Cent kisojn mi deziras.
- Korteganino*: Ho dio, tiom multe?! (*revenas*).
- Reĝidino*: Nu, kiom ĝi devas kosti?
- Korteganino*: Li volas ricevi cent kisojn de la reĝidino.
- Reĝidino*: Mi opinias, ke li freneziĝis (*ili iras pluen, sed ĝuste la paŝtisto ekludas belegan dancon, tiel ke ili rapide sin turnas kaj ekdancas laŭ la muziko*). Oni devas subteni la arton. Por tio mi estas ja filino de la imperiestro! Diru al li, ke mi donos al li dek kisojn, la ceterajn li povas preni de miaj korteganinoj!
- Korteganinoj*: Sed ni farus tion tiel nevolonte!
- Reĝidino*: Babilajo! Se mi povas lin kisi, ankaŭ vi tion povas. Memoru, ke mi devas doni al vi nutraĵon kaj salajron! (*Unu kort. riverencas kaj iras; antaŭe ŝi surmetas la lignoŝuojjn*).
- Korteganino*: Aŭdu, porkopaŝtisto, la reĝidino donos al vi nur dek kisojn kaj ni ankoraŭ naŭdek.
- Reĝido*: Mi malakceptas. Cent kisojn de la reĝidino, aŭ ĉiu el ni konservos sian havon.
- Korteganino*: Mi diros tion! (*reiras*).
- Reĝidino*: Nu?
- Korteganino*: Li estas obstina. Vi devas doni la cent kisojn al li.
- Reĝidino*: Jes, mi do oferu min por la arto. (*ili kuras al la paŝtisto*). Stariĝu antaŭe. (*la korteganinoj ĉirkaŭstaras*). Cent kisojn mi donos, sed ne unu pli.
- Reĝido*: Bone, sed ankaŭ ne unu tro malmulte. (*la reĝidino kisas, la kort. tute honeste kalkulas; intertempe aperas la imperiestro en la pordo, rigardas scivolome kaj mirigite, neniu rimarkas lin*).
- Imperiestro*: Kion povas signifi tiu homamasigo tie apud la porkejo? (*li viŝas la okulojn, surmetas okulvitrojn*). Tie partoprenas ja la korteganinoj. Mi iros al ili. (*Rapide surmetas pantoflojn, proksimiĝas senbrue, ekstaras sur la piedfingroj*). Kio do tio estas? (*ekbatas ilin per pantoflo*).
- Imperiestro* (*al la korteganinoj*)! For! (*ili forkuras*) (*al la reĝidino*). Kaj

vi, vi povas edziniĝi al la porkopaŝtisto. (*al la reĝido*): Sed vi, porkopaŝtisto, tuj forlasu mian kortegon. Mi tuj maldungas vin. Vi tute malsukcesis en via kariero! For! (*la imperiestro foriras*).

Reĝidino: Ho, mi malfeliĉa homido!

Reĝido: Nu, ne ploru, ni kune vagos tra la mondo. Mi faros potojn kaj kaldronojn kaj vi kantos.

Reĝidino: Ne, tian aĉan porkopaŝtiston mi ne povas toleri. Kial mi ne prenis la belan reĝidon?! Ha, kiel malfeliĉa mi estas.

Reĝido: Ho, atendu momenton. (*donas al ŝi la knarilon, iras en angulon, forĵetas la ĉapelon kaj jakon, reiras al ŝi*). Kaj kiel mi nun plaĉas al vi?

Reĝidino: (*kliniĝas*). Kiom bela vi nun estas. Nun mi volas kun vi, kara reĝido.

Reĝido: Vi kaŭzis tion, ke mi devas vin malestimi. Vi ne volis havi honestan reĝidon! Vi ne komprenis la valoron de rozoj kaj najtingaloj, sed la porkopaŝtiston vi kisis pro ludilo. Tion, kion vi nun suferas, vi merit-
tis! Mi foriras en mian regnon. (*foriras; la reĝidino volas sekvi lin, sed jam li estas for*).

Reĝidino: Kion mi nun faru? (*ŝi turnas la knarilon, kiu ekludas: Ha, vi kara Aŭgusteno. La reĝidino kantas finfine*): Ha, mia kara Aŭgusteno, ĉio estas for!

PRI LA SKRIBA KURSO.

Certe multaj legis en la antaŭa numero la artikoloĵeton pri la skriba kurso (paĝo 30).

Tiu artikoloĵeto al diversaj personoj diverse efikis. Kelkaj diris: „Bonega plano. Ĝi meritas nian plenan subtenon. Ni varbos kursanojn kiom eble plej multajn!”

Aliaj opiniis: „Ne malbona elpenaĵo. Mi esperas, ke ĝi sukcesos”.


Unu el la plej bonaj amikoj de „La Juna Vivo” iom malice ridetante diris: „Kiaj fantaziuloj vi estas. Vi konstruas kastelojn en la aero. Certe la kurso estas nekredeble malkara — 80 cendoj por lernolibreto, klarigaj leteroj, korektado —. La kondiĉoj por la varbantoj de abonantoj estas eksterordinare allogaj. Kaj tamen: fariĝos fiasko. Vi faras grandan eraron: Vi kredas ke la „Juna Vivo”-legantoj helpos vin. Vi ne scias, ke Esperantistoj laŭnature ĉiam — esperas, neniam agas. Se iliaj bondeziroj povus helpi vin, vi certe atingus vian celon. Sed via sukceso dependas de ilia efektiva helpo. Kaj tiu forrestos”.

Tiel li grumbas, la amiko mia. Intertempe li petis dek kuponojn kaj jam vendis kelkajn. Tia li estas.

Al vi, legantoj, la tasko hontigi lin. Pruvu, ke li estas klaĉulo, ke li juĝas pri aliaj laŭ sia propra nigra koro. Montru vin fervoraj batalantoj por nia movado. Senprokraste turnu vin al la redakcio kaj petu dek kuponojn. Se vi ne sukcesos vendi ĉiujn vi kompreneble rajtas resendi la nevenditajn.

En la venonta numero mi montros al vi la belegan veturilon per kiu vi venontjare **senpage** povos vojaĝi al Svisio aŭ Praho.

ENIGMOJ



a, a, b, b, e, e, e, e, e, i, i, k, k, k, l, l, m, m, n, n, n, n, o, o, o, o, o, p, p, p, p, r, r, r, s, s, s, s, t, t, t, u, u.


La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale:
1. monaton; 2. lingvon; 3. malpuraĵon.

Riga (Latv).

B. REICHBERG.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn.
Solvojn ni akceptos ĝis 15 Novembro '37.

LA SOLVO EL NO. 1.



La premiojn gajnis J. v. d. Ben kaj M. v. d. Ben, ambaŭ en Kwadyk (Ned).

La red. volonte ricevos simplajn enigmojn (kun solvoj!).

LUDO (Ludi komedion).

La gvidanto rakontas aŭ legas iun historieton. Tiam li dividas la „rolojn”. Oni tuj komencas la unuan prezentadon. Do sen lernado aŭ ripetado. La ne-rolantoj estas la publiko. Ĉiu ludu nature, per la helpo de sia fantazio; sed ĉiu devas sekvi la historieton. La publiko aplaŭdas, alportas florojn, ktp. Oni havos sukceson, sed nur, kiam ĉiuj **kune** ludas!

Buinen (Ned.)

M. MEDEMA.

4. LA VINTRO JAM FORPASIS.

Dolĉe kaj trankvile.

G D G e a ā D⁷ G

1-G 5 | 1 1 2 5 | 3 . 3 4 | 2 1 2 7 | 1 . . 5 5 |

La vintro jam for - pa - sis, Al - venas nun la maj': La

G D G e a ā D G

1 1 1 2 5 | 3 . 3 4 | 2 1 2 7 | 1 . . 1 2 |

floroj re - a - pe - ras, En mi - a kor' la gaj'. Res-

e e a a D⁷ G e ā D

3 3 3 2 3 | 4 . 4 4 | 3 1 2 4 3 | 2 . . 5 5 |

ta - do es - tas ĝu - o Sur monto kaj en val'. La

G D G e a ā D⁷ G


1 1 1 2 5 | 3 . 3 4 4 | 2 1 2 7 7 | 1 . . ||

bir - doj - kan - ta - das ti - e Kaj ankaŭ la najtingal'.

La majon mi nun volas
 Festadi laŭ kutim';
 Kaj ĵuri fidelecon
 Al mia amatin'.
 Kaj peti, ke ŝi venu
 Al sia fenestret';
 Kaj kisojn akceptu miajn
 Kun mia florbuked'.

Trad. J. v. SCHOOR.

(Flandra popolkanto el la mezepoko).



D.ro Barreto kun lia filineto, malgranda esperantistino.

kolojn li verkis por la portugalaĵ gazetoj. Li ankaŭ publikigis „Hinda Civilizacio” kaj kelkajn poemojn. Mallonge, li estis unu el la plej bonaj verkistoj de la nova portugala generacio. Multon li fordonis al la malriĉuloj, kaj lia flegado en la sanatorio nur eblis per la monhelpo de liaj amikoj, kiuj kutimis nomi lin „La dua Zamenhof”.

Ke li restu en la memoro de ĉiuj Esperantistoj!

FIDELA BATALANTO MORTIS.

La 6an de Aŭg. mortis en la aĝo de 33 jaroj en la sanatorio de Coimbra (Portugalia) D.ro Adeodato Barreto, fidela amiko de „La Juna Vivo” kaj propagandisto de Esperanto.

D.ro Barreto naskiĝis la 3an de Decembro en Salsete (port. Hindujo). Poste li fariĝis advokato kaj notario en Aljustrel. Li estis la unua, kiu fondis tie Esp. kurson. Li laboregis por la plej noblaj idealoj kaj estis vera amiko de la homaro. Multajn propagand-arti-



Nia fervora „Juna Vivo”-grupo en Aljustrel (Portugalia).

Por komencantoj.

SI NE REKONIS LIN!

Unua patrino: Estas terure, kiom la infanoj malpuriĝas en ĉi kota vetero!

Dua patrino: Ho, silentu pri tio. Hieraŭ mi lavis jam dek knabojn, antaŭ ol mi rimarkis mian propran filon!

BONA RESPONDO.

Oni ekzamenis junan mariston.

„Imagu, ke vi estas kapitano de ŝipo, kaj veturas en riĉplena maro. Subite vi ricevas radiogramon, kiu anoncas ŝtormon el la sudokcidento. Kion vi farus?”

„Mi ankrigus la ŝipon.”

„Kaj se nova radiogramo anoncus ventegon ankaŭ el la nordo?”

„Mi elĵetus alian ankron.”

„Kaj se oni poste anoncus ankoraŭ uraganon el la oriento?”

„Mi denove elĵetus alian ankron.”

„Sed, ĉe Jupitero, de kie vi prenis tiom da ankrtoj?”

„Kaj de kie vi prenis tiom da vento, sinjoro?”

El „La Lernanto”.

TEMPO ESTAS MONO.

Komercisto intencis fari longan vojaĝon. Li adiaŭis siajn amikojn kaj diris: „Mia tempo estas grandvalora. Pro tio nur skribu, kiam absolute necesos. Mi tute ne ŝatas ricevi leterojn. Kutime ili servas al nenio.”

Unu monato pasis — du, tri monatoj. La komercisto ne revenis kaj ankaŭ ne skribis. Liaj amikoj maltrankviliĝis, sed ne kuraĝis skribi. Subite unu el ili havis bonan ideon. Sur paperfolion li skribis nur grandan demandsignon. Tio signifis: „Ĉu io nova?”

Post kelkaj tagoj venis la respondo. Oni malfermis la leteron kaj trovis — nur blankan paperfolion. Oni komprenis, ke tio signifas: „Nenio”.

<p>Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe le redakcio de „La Juna Vivo”! (Petu senpagan libro-liston!!)</p>
--

AFABLECO.

„Vi diris al tiu viro, ke la distanco al la stacidomo estas ne pli ol kvin minutoj, kaj vi bone scias, ke ĝi estas almenaŭ duona horo!”

„Jes, sed li estis tiom afabla kaj ĉarma, krome li aspektis tiom lace, ke mi kompatis lin.”

TRAFA RESPONDO

Riĉa sinjoro ofte ricevas donacojn de unu el siaj amikoj. Tamen la servisto, kiu alportas la donacojn neniam ricevas trinkmonon. Unu tagon li devas porti al la avarulo grandan leporon. Li eniras la ĉambron kaj diras mallonge: „Jen leporo”.

La sinjoro eksaltas kaj diras: „Ĉu vi ne povas esti pli ĝentila? Mi donos ekzemplon al vi! Sidiĝu en mian seĝon. Nun mi estas la servisto kaj vi ricevas la leporon. Aŭskultu, kiel servisto devas paroli!”

La sinjoro iras al la pordo. Poste li revenas kaj diras ĝentile: „Sinjoro, mia mastro petas vin akcepti ĉi tiun modestan donacon kaj li deziras scii, kiel vi fartas”.

La junulo respondas: „Dankon, dankon, mi fartas tre bone. Kaj jen, guldeno por vi”. Samtempe li faras kvazaŭ li prenas moneron el sia veŝpoŝo.

Kompreneble la sinjoro ridas kaj la junulo ricevas guldenon.

Parizo (Franc.)

LECHELLE.

Respondu skribe al jenaj demandoj:

Kion la riĉa sinjoro ofte ricevis? De kiu li ofte ricevis donacojn? Kiu ĉiam alportis la donacojn? Ĉu la servisto ion ricevis? Ĉu la riĉa sinjoro estis avarulo? Kion la servisto iun tagon alportis al la avarulo? Ĉu la leporo estis granda? Ĉu la servisto estis afabla? Kion li diris? Kion faris la sinjoro? Ĉu li opiniis la serviston afabla? Ĉu li donis ekzemplon al la servisto? Kion li faris? Kion respondis la junulo? Kion li faris? Ĉu la sinjoro estis kolera? Kial li ridis? Kion ricevis la junulo?


Tasko:

1. **Kopiu kaj traduku en vian kajeron:** „Ŝi ne rekonis lin”. „Bona respondo”. „Tempo estas mono”. „Afableco”. „Trafa respondo”.
2. Lernu parkere: „Afableco”. „Tempo estas mono”.
3. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de: „Bona respondo”.
4. Rakontu ĉion, kion via patrino faras post la tagmanĝo. (Kien ŝi metas la manĝilaron, kiujn objektojn ŝi purigas, kie, per kio, ktp).
5. Faru verkaĵon pri la somero.

VOJAĜO AL SVISUJO KAJ PARIZO.
(Vizito al la Palaco de la Ligo de l' Nacioj).

Post kelkminuta atendo en la belega akceptejo ni estis kondukataj al subtera filmsalono, kie oni prezentis mallongan, tamen interesan filmon pri la laboro de la Ligo. La filmaktoroj parolis angle. Certe dudek el nia grupo ne scipovis tiun lingvon. Pri tio ni faris rimarkon al la sinjoro, kiu gvidis nin. Li nur levis la ŝultrojn. Ne estis ja lia kulpo.

Poste li montris al ni la tutan konstruaĵon kaj klarigis ĉion angle kaj — holande. Estis surprizo por ni. Kaj kiam li rakontis, ke li ankaŭ povas paroli hispane kaj itale, ni ne povis ne admiri la simpatian viron, kaj ni pensis: Kiom da lingvaj malfacilaĵoj oni devas venki ĉi tie. Kiom da nebezona tradukado de raportoĵ, paroladoj,



artikoloj ktp. Kaj ni krome pensis: Se oni entreprenas tiom grandiozan laboron, kiom estas la laboro por paco inter la nacioj, se oni vere deziras la interfratiĝon de la popoloj, kial oni ne komencas ĉe la fundamento, kial oni ne akceptas unu internacian lingvon!

Estas ankoraŭ pli: Oni ofte plendas ke la tuta ligo estas nur angla entrepreno. Kaj vere, se en la filmo eĉ la franco Avenol parolas angle kaj ĉiuj surskriboj en la konstruaĵo tekstas nur angle kaj france, la vizitanto sin demandas: „Kial ĉi ĉio?”

Kiel belega ŝanco per unu gesto senfortigi la riproĉon per enkonduko de la neŭtrala lingvo Esperanto!

Sur unu el la multaj larĝaj ŝtuparoj ni renkontis alian grupon da vizitantoj en kies mezo estis iu, kiu portis nian verdan stelon. Montriĝis, ke li estas franca esperantisto. Montriĝis ankaŭ ke li estas abonanto je „La Juna Vivo”. — Vera surprizo tia renkonto. — Kaj pro ĉi simpla okazo ni denove konvinkiĝis: Jen la solvo. Iam la homaro akceptos ĝin. Eble nur post multaj jaroj. Nu, al ni la ĝojo esti la pioniroj en la batalo por Esperanto!

(Parto el artikolo de S.ro BONTJE).



KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

Ĉeĥoslovakujo: S.ro Fr. Lunáčĉek, Susilova 62, Boskovice, dez. kor. kun Afrikanoj, Sudamerikanoj, Orientanoj kaj Insulanoj.

Latvujo: S. ino Liza Jenzens dez. interŝ. il. poŝtk. kun tutmondaj gesamideanoj. Adr: Riga, Setas i. 1—16.

Ĉeĥoslovakujo: Jaroslav Kiemének, 12 jara knabo, Těsetice ĉe Olomouc volas korespondi kun ĉiuj landoj.

Ĉeĥoslovakujo: 14 jara liceanino dez. kor., interŝ. poŝtk., poŝtm., kun la tuta mondo. V. Lhotská, Praha-Liben, Podvini 73.

Ĉeĥoslovakujo: 17 jara stud. dez. kor. kaj interŝ. poŝtm. kun rum. kaj jugosl. filat. Lubomír Sura, Košice, Mäsiarská 59.

Franĉujo: F.ino J. Lair dez. kor. kun gesamideanoj, kiuj instruas muzikon. Adreso: 35 Rue Charles 3, Nancy.

Hispanujo: Artemia Espanjol, strato Major 40 (Tarr), Alcover, dez. kor. kun geesperantistoj en la tuta mondo. Certe respondos.

Nederlando: S.ro A. H. Warmerdam, Slotweg 385, Egmond a/d Hoef, 19 jara, dez. kor. kun f.inoj en la tuta mondo.

Nederlando: Lies Molenaar, 14 jara knabino, Middellie (vilaĝeto) N.H. dez. kor. kun eksterlandaj geknaboj. Resp. certa.

Nederlando: Ot de Ruiten, 14 jara knabo, Middellie (N.H.) dez. korespondi kun geknaboj el ĉiuj landoj. Respondo certa.

Latvujo: S.ino M. Beizot dez. interŝ. il. poŝtk. kaj leterojn kun eksterlandanoj. Riga. Pasta kaste 844.

Danujo: S.ro C. H. Lundholm, „Solvang”, Maarslet, deziras interŝanĝi poŝtm. Posedas multajn.

Hungarujo: Mi volas korespondi kaj interŝ. ilustr. poŝtk. kaj poŝtm. kun geknaboj. Emeriko Brand, Abaújszántó, Rákóczi u 71.

Ĉeĥoslovakujo: Otakar Hoffmann, fakinstruisto, Otrokovice, Morava, dez. interŝ. poŝtm. kaj poŝtk. Resp. certa. Serĉas gekorespondantojn por 11—14 jaraj lernantoj.

Nederlando: S.ro C. Mulder, Jan v. Kuikweg 21a, Heemskerk, dez. kor., interŝ. poŝtk. il., ilustritajn gazetojn, ktp.

Portugalujo: F. A. Rasquinho Junior, Aljustrel, demandas al Dagmar Lind, Svedujo, kaj al E. Jouil, Ing. Kampk., Rouen, kial ili ne respondas al li.

Finnlando: S.ro N. Arpomaa, Petäjärvi, Ryhmä, dez. kor. kaj interŝ. poŝtm. kaj il. gazetojn kun tutmondo. Kiu afrankas filatele ricevos esp. gazeton!

Ĝenerale la sendantoj de korespondadresoj skribas: „Respondo certa”. Tamen ŝajnas, ke oni ne ĉiam plenumas tiun promeson! Unu abonanto plendas, ke li plurfoje skribis je anonco, kaj ne ricevis respondon. La sendantoj de korespondadresoj bonvolu atenti, ke estas ilia devo respondi almenaŭ unufoje al kiu ajn skribinto!

SKRIBU VIAN ADRESON ĈIAM PRESLITERE!

ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio).

KURSGVIDANTOJ! Ne timigu viajn lernantojn per multekostaj lerniloj. Uzu la „**INTERNACIA LERNOLIBRETO**” — „**LA JUNA VIVO**”: simpla laŭ aspekto — alloga laŭ enhavo. Prezo nur 0,20 gld. Je mendoj de sufiĉe granda kvanto oni ricevas rabaton! Petu specimenon!

„**SLOVENIO — PERLO DE JUGOSLAVIO**”, belega 96 paĝa albumo, red. S.ro Damjen Vahen. Ne-jugoslavanoj povas ricevi ĉi belan verkon kontraŭ unu resp. kup. (aŭ 15 cendoj) de red. „La Juna Vivo”.

DANA ESPERANTISTO deziras dum la venonta vintro instrui eksterlande, en Nord-Holando aŭ Ĉeĥoslovakujo. Lernilo verŝajne estos la internacia lernolibreto „La Juna Vivo”. Kiuj bezonas eksterlandan instruiston skribu al: S.ro H. Michels, Skodborg J. Danujo.

MALSANULO, kiu jam dum pli ol kvar jaroj kuŝas en la lito, petas al ĉiuj Esperantistoj, sendi poŝtmarkojn al li, por ke li povu esti sendata Svisujon. Por tiu celo li bezonos almenaŭ 1000.000 ekz. Al ĉiu, kiu helpos lin, li sendos poŝtkarton. T. W. H. Rasink, Leuvenstr. 23, Leiden, Nederlando.

OP DE BRES VOOR ESPERANTO, de **G. J. Bontje**. Serio da bonegaj propagandaj artikoloj por Esperanto. Prezo 0,35 gld. Mendebla al „LJV”.

BULTENO DE INT. SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA, dumonata, ilustrita revuo, 16 paĝoj, granda formato. Jarabono 1,35 gld. Abonebla ĉe „LJV”. Petu specimenon.

LITERATURA MONDO, nia sola literatura gazeto, Kunlaboras ĉiuj gravaj esperantistaj verkistoj. Jarabono 4,50 gld. Specimeno 0,20 gld. La plej detalajn kaj objektivajn librokritikojn vi trovas en „**LINGVO LIBRO**”, kvaronjara aldono al „L.M.” Aparta abono 0,40 gld. Specimeno 0,10 gld. Ambaŭ revuoj estas mendeblaj al „La Juna Vivo”.

SKRIBA KURSO

por **A. kaj B.**

(nur por holandlingvanoj).

Tre detala B-kurso. Gvidanto

Simon Aarse.

Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis.

**La Verda Stelo, Radioweg 45,
Amsterdam-O.**

En **LEEWARDEN** (Ned) mortis la 4an de Septembro nia fidela abonantino

AGATHA MARIA WIERSMA

en la aĝo de 46 jaroj.

En ŝi ni perdis fervoran propagandistinon por nia movado.